

& Apologio de La Fontaine:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis La Fontaine (La leono kaj la paŝtisto). El franca tradukis (?) Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo Klarigoj (*): '6 Fedro, pragreke Φαίδρα, mita filino de la kreta reĝo Minoo kaj lia edzino Pazifao ; Ezopo, pragreke ΑΙΣΟΠΙΟΣ, mita sklavo kaj fablojn verkinto.>

(#Melodio:

<:> (La /LaLa dodo mi redo Tido reTi do La a;La LaLa dodo mi redo Tido reTi do La;

(#Rekantaĵe: do TiLa So SoSo Mi SiSi La; do TiLa So SoSo Mi Si La; do TiLa So So o))×8)+

(&Strofoj:

'1 La /fablo ja ne estas nur tio, kiel ŝajnas ; Ni de l' plej simpla besto edifon tie gajnas.

(×: **Jen estas fabloj en longa seri'** ; **Ilin aŭskultas kun ĝojo ni** ; **Jen estas fabloj**.)

'2 La moralaĵo nuda — ĝi estas nur enuo. ; Perdiĝas tia fablo kune kun la instruo.

'3 Sed fabli nur por fabli — ŝajnas senvaloraĉe, ; samtempe oni devas instrui, ĉarmi plaĉe.

'4 Jen kiel, kun spirito spicita per gajeco, ; famuloj multaj verkis en tiu ĉi artspeco.

'5 Ornamoj, etendadon de diro ili evitas, ; vane perditajn vortojn ĉe ili ni ne vidas.

'6 Fedro* koncizas tiom, ke trafis lin riproĉo, ; Ezopo* eĉ pli multe ŝparegas pri la voĉo,

'7 sed unu grek' superas ĉi ambaŭ; li tre vanta ; pri lakoneco eleganta,

'8 ĉiam nur en kvar versojn enfermas sian temon. ; Kiel? Prijuĝu spertaj, havantaj kritikemon.)